

V-19479/
28.1959

BULGARA

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

2

JARO XXVIII

FEBRUARO

1959

BULGARA ESPERANTISTO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01

Cefredaktoro: Violin Oljanov

Redakta komitato: Ivan Sarafov,
Stefka Hristova, Stefan Kiraglev,
Stefan Maserov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por fremdlando — 16 levoj aŭ
1,5 dolaroj jare.

Tarifo por reklamoj: 5 levoj por 1 cm²;
korespondanoncoj — 1 levo por
ĉiu vorto; eksterlandanaj adresoj
estas presataj senpage.



KONKURSO

por plej bonaj korespondantoj

La redakcio de «Bulgara es-
perantisto» premias tri plej
bonajn korespondantojn, kiuj li-
veros regule sciigojn pri la so-
cietata agado, artikolojn pri orga-
nizaj demandoj k. a. Estos
publikigitaj la nomoj de la dek
plej bonaj korespondantoj.

Templimo de la konkurso —
la fino de la jaro.

ENHAVO

La kolektado de membrokotizo — grava organiza laboro	1
Organiza vivo	3
Literaturaj paĝoj — Ljuben Ka- ravelov	6
Rido-ploro	
Esperanto malpermesata	10
Ĉu?!	12
Lingva konsilejo: Kunmetitaj vortoj	12
Esperanto kaj la majusklomanio	14
Esperanto en la mondo	15

PAGU VIAN ABONON!

LA REDAKCIO akceptas materia-
lojn por la koncerna numero de «Bul-
gara esperantisto» ĝis la 12-a de la
antaŭa monato. Nur kiel escepto gra-
vaj aktualaj materialoj estos akcep-
tataj ĝis la 25-a de la antaŭa monato.

La aŭtoroj estas petataj skribi tre
klare, kun granda interlinia spaco
kaj margeno. Manuskriptoj ne estas
resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

LA KOLEKTADO DE MEMBROKOTIZO — GRAVA ORGANIZA LABORO

Regula pagado de membrokotizo okupas tre gravan lokon en la organiza laboro de kiu ajn organizaĵo. Des pli grava ĝi estas por niaj societoj, kiuj plejparte estas en periodo stabiliga. Klopodi kaj organizi regulan pagon de membrokotizo — tio signifas ne nur garantii konstantan enspezon de monrimedoj por la societoj, sed ankaŭ krei konstantan organizon kun la anoj, informi kaj engaĝi ilin por partopreno en la societa vivo, ĝustatempe abonigi ilin por nia organo «Bulgara esperantisto», varbi novajn anojn inter neorganizitaj, izolitaj esperantistoj ktp. Konklude, la regula kolektado de la kotizo sisteme memorigas al la societanoj pri ilia membreco kaj devo al la movado, mobilizas ilin, kio havas grandan influon al la ĝenerala societa laboro.

Kompare kun 1957 jaro la nombro de la pagintaj membroj por 1958 jaro al la asocio plialtiĝis per kelkaj centoj. Al tio kontribuis multaj societoj kiel ekzemple: «Libero» — Ruse de 14 regulaj membroj en 1957 atingis 58, «Nigra maro» — Burgas, de 37 — 70, «Albatro» — Varna de 132 — 255, «Kulturo» — Plovdiv, 129 — 299, «Stelo de l'paco» — vilaĝo Rozino, de 11 — 32 kaj aliaj. Sed tio tute ne respondas al la kreskanta intereso al nia movado dum lasta tempo kaj aparte post nia 33-sukcesoplena kongreso. Anstataŭ plikresko de la membraro, en kelkaj societoj estas malaltiĝo de la membroj. Ekzemple societoj «Vekiĝo» — Kolarovgrad, en 1957 jaro havis regulajn membrojn 108, dum 1958 — 79, «V. Levski» — Levskigrad, 1957 jaro — 128, dum 1958 — 77, Sofia fervojista societo 168 — 101 k. a. Bedaŭrindaj estas ankaŭ societoj kiel tiuj en Targoviŝte kun 16 regulaj membroj dum 1957 j., Parvomaj kun 12, Stacidomo «Gorna Orjahovica» — 8 k. a. kiuj por la jaro 1958 ne havas eĉ unu regulan membron.

La ĉefa kaŭzo por ekzisto de tia neĝojiga fenomeno en nia organiza stato estas en la neorganizita nesistema kolektado de membrokotizo. Por faciligi la membrojn kaj ankaŭ la societojn kaj por akceli la pliigon de la anaro, la dua plenkunsido de CK de BEA decidis, ke oni povas

pagi membrokotizon anstataŭ unufoje por la tuta jaro, kiel ĝis nun — kvarfoje dum la jaro, potrimonate. Novaj membrokartoj estas presataj. Ili validos por kelkaj jaroj. Sur ilin oni markos la trimonatan pagon de l'kotizo.

Tiu ĉi decido ankaŭ kontribuos por pli regula kontakto inter la estraro kaj ĝia aktivularo unuflanke kaj la societanaro — aliflanke.

La decidoj de CK devigas la societon reorganizi sian laboron por plenumi sukcese tiun taskon. La ĝisnuna praktiko de multaj societoj, en kiuj la kasisto mem kaj sola prizorgas la kolektadon de membrokotizo, estas erara kaj malutila.

La kasistoj, kiel ĉiuj anoj de la societa estraro, estas gvidantoj, organizantoj. Ili devas krei al sia fako organon de la plej aktivaj samideanoj, kiuj laŭplane kolektos de la anoj la kotizon.

La membraroj de la plej grandaj societoj devas esti dispartigitaj je grupoj po 10 — 20 anoj, teritorie, laŭ la loĝlokoj de la anoj, kaj la gruprespondeculo konstante havu kunligon kun ili kaj lia unua tasko estu regule potrimonate kolekti la membrokotizon.

Ĉiu grupestro havos la nomaron de sia grupo kaj notos ĉies kotizon por la koncerna trimonato. Viziti 10 aŭ 20 samideanojn foje aŭ dufoje en tri monatoj por kolekti la kotizon tute ne estas malfacila tasko. Eĉ la grupestro pli ofte devas viziti la samideanojn de sia grupo, precipe tiujn, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne vizitas la kunvenojn, por havi konstantan ligon kun ili, por informi ilin pri la novaĵoj en nia movado, por mobilizi ilin.

Tiuj societoj, kiuj regule kolektas la kotizon, ne nur havos bonan financon staton, sed havos ankaŭ firman, disciplinitan organizaĵon.

La societoj de nun elŝuldigos la membrokotizon al la asocia kaso ĝis la fino de marto por la unua trimonato, ĝis la fino de junio por la dua trimonato, ĝis la fino de septembro por la tria trimonato, ĝis la fino de decembro por la kvara trimonato. La societoj estos konsiderataj regulaj al la asocio nur se estas pagintaj la kotizon en tiuj limtempoj. Kompreneble, estas dezirinde ricevi la kotizon antaŭ la fino de la koncerna trimonato. Ĉiu membro estos konsiderata regula kaj rajtos profiti la servojn de la asocio, se estas paginta la kotizon almenaŭ por la lasta trimonato, kion li povos pruvi per la membrokarto.

La kotizo de la membroj-subtenantoj devas esti elŝuldata al la asocio tuj post ĝia pago fare de la ano, por ke lia (ŝia) nomo estu publikigota en la unua postsekva numero de «Bulgara esperantisto». Membroj-subtenantoj estas tiuj anoj de la asocio, kiuj pagos krom la kotizon por la tuta jaro ankaŭ minimume 10 levojn. Kiel la duonon de la fundamenta kotizo, tiel ankaŭ la duonon de la plusa subtenanta kotizo la societoj sendas al CK de BEA.

Lernantoj, studentoj kaj aliaj samideanoj, ne havantaj enspezon, pagas duonon de la kotizo — 1.50 levojn por trimonato.

De nun eĉ unu membro de la societo ne devas resti neregula dum iu periodo. Antaŭen, gesamideanoj, por atingi la ciferon de 4500 regulaj membroj de BEA!

NOVA STELO SUR LA VERDA FIRMAMENTO

La 15-an de januaro 1959 jaro laŭ iniciato de s-ano D. Haĝiev en la ŝtata biblioteko «Vasil Kolarov» en Sofio okazis renkontiĝo inter sofiaj esperantistoj kaj bibliotekaj oficistoj kaj laboristoj.

En la ofica kabineto de la bibliotekdirektoro k-do Georgi Miĥajlov, konvene ornamita per esperanta standardo, portreto de d-ro L. L. Zamenhof kaj malgranda ekspozicio el esperantaj eldonaĵoj — libroj kaj revuoj, kolektiĝis 25 samideanoj kaj estontaj gekursanoj.

Post mallonga prelego de s-ano G. Dolapĉiev pri la nuna stato kaj la sukcesoj de la Esperanto-movado en la mondo kaj en Bulgario kaj post la informaj vortoj de s-ano Iv. Sarafov koncerne la unuajn esp. eldonaĵojn en Bulgario dum 1888 jaro la parolon prenis la direktoro de la biblioteko, kiu vigle kaj forloge parolis pri la signifo, utilo kaj valoro de Esperanto kaj pri sia agado kiel esperantisto en la pasinteco.

La ĉeestantoj eksciis tre interesajn aferojn pri veraj mirakloj de amikeco kaj kontakto per la internacia lingvo.

La direktoro Georgi Miĥajlov, kvankam scipovanta 12 lingvojn, nur per Esperanto havis senperan

kontakton kun vivaj homoj en ĉiuj partoj de la mondo. La direktoro de la biblioteko rekomendis al ĉiuj ĉeestantoj lerni Esperanton, ĉar ĝi estas la ŝlosilo, la unua ŝtupo por lernado de fremdaj lingvoj.

K-do Georgi Miĥajlov emfazis, ke la malfermota kurso devas esti la kerno de Esperanto-kolektivo ĉe la biblioteko, al kiu kolektivo antaŭstaras serioza kaj grava laboro: pristudi kaj apartigi en specialan fakon la esp. librojn kaj revuojn, kiuj nun troviĝas en la biblioteko. Elserĉi, precizigi kaj kompletigi la bibliografion de la esp. eldonaĵoj en Bulgario. Zorĝi pri baldaŭa riĉiĝo de la esp. fako per abono al nun aperantaj revuoj, aĉeto de novaj esp. libroj kaj interŝanĝo de tiaspeca literaturo kun fremdlandaj bibliotekoj, kun kiuj la biblioteko «Vasil Kolarov» havas interŝanĝkontaktojn. Diversmaniere konigi al la biblioteka legantaro la ekziston de la Esperanto-fako ĉe la biblioteko kaj disponigi ĝiajn librojn kaj periodaĵojn al la bezonantoj.

Ni bondeziras sukceson al la nova Esperanto-grupo en grava kultura instituto — la nacia biblioteko!

Metodi Panĉev

Strato „Esperanto“

La popola konsilantaro de urbo Kubrat nomis unu el la stratoj «Esperanto» okaze de la Zamenhof-jaro. Ni gratulas la gesamideanojn el Kubrat, kiuj bone plenu-

mas la direktivojn de CK de BEA.

Ni esperas, ke ankaŭ aliaj societoj baldaŭ ĝojigos nin per similaj sciigoj.

PAZARĜIK. — Nun ĉe Esperanto-societo «Radio»-Pazarĝik funkcias kurso por komencantoj, gvidata de Rosica Georgieva. La sekretario de la societo k-do Petko Arnaudov gvidas du kursojn: por komencantoj en la gimnazio kaj por progresintoj. La partoprenintoj en la pasintjara kurso por geinstruistoj nun daŭrigas la lernadon memstare.

En la komenco de decembro 1958 la societo aranĝis letervesperon, ege sukcesplena. Estis ricevita 53 leteroj, kartoj k. a. esperantaĵoj el USSR, Germanio, Hungario, Francio, Ĉeĥoslovakio, Maroko, Pollando, Brazilo, Italio k. a. Al ĉiuj skribintoj koran dankon!

La 18-an de decembro 1958 la societanoj festis la Zamenhofan datrevenon. Prelegis la prezidanto de la societo k-do Ivan K. Vasilev. Memo-

rojn pri Esperanto-movado en nia urbo rakontis s-no Vasil Genĉev, unu el niaj pioniroj.

La amase venintaj societanoj estis agrable surprizitaj de la belarta, modesta, sed bone plenumita programo, de la lerneja kurso. La programon partoprenis la gelernantoj: E. Petkova, E. Bojaĝieva, P. Vasileva, J. Mackanski, M. Valkova k. a. Kun akompano de akordiono estis kantitaj esperantaj kantoj.

Per la loka radia centro parolis al la urbanoj pri nia Majstro kaj pri Esperanto s-ano Aleksandro Arnaudov.

En la urba ĵurnalo «Septemvrijsko zname» kaj en la distrikta ĵurnalo «Oteĉestven glas» aperis artikoloj kaj sciigoj pri la societa vivo.

Petko Arnaudov

Esperantistoj, pereintaj por la libero

DILO JOTOV BOJNOV



La 1-an de majo 1932 j. estis mortvundita kaj post du tagoj mortis la fidela filo de la partio kaj de l'popolo — Dilo Jotov Bojnov.

Dilo Jotov estas naskita en 1905 en la batalema vilaĝo Toros (nun — Lazar Stanevo), regiono de Lukovit. Li devenas de malriĉa familio kaj restis de frua infanaĝo orfo sen kia ajn subteno. Li sukcesis finitrian progimnazian klason kiel unu el la sciamaj kaj bonaj lernantoj de la popola instruisto-heroo Lazar Stanev. Li poste lernis metion kaj fariĝis feraĵa laboristo.

Ne povinte studi en la lernejo, li aŭtodidakte multe legis kaj fariĝis bone instruita junulo. Li legis ĝeneralan kaj marksisman literaturon, li lernis la germanan lingvon kaj la lingvon internacian Esperanto. Dilo komencis viglan korespondadon kun laboristoj en USSR kaj diversaj kapitalistaj landoj. Per sia granda kulturo, laboremo, honesteco kaj modesteco li gajnis la korojn de la tuta junularo en la vilaĝo, kiel membro de la Laborista junulara asocio kaj de la Laborista partio li aktive partoprenis en ĉiuj partiaj kaj junularaj akcioj. Li havis belegajn kvalitojn de aganto kaj organizanto de la amasoj. Dilo estis rekonita kiel gvidanto de la junuloj. Li instruis al ili senpage Esperanton kaj kiam la oficiala lerneja aŭtoritato malpermesis al li instrui la lingvon el la lerneja ĉambro, Dilo gvidis la kursojn en sia patra hejmo, kiu fakte fariĝis partia kaj junulara klubejo. Tie oni kantis laboristajn kantojn, legis laboristajn ĵurnalojn, organizis infanan kaj virinan grupojn. En septembro 1930 j. okaze de la internacia tago de la junularo Dilo estis arestita kaj ĵetita en malliberejon de Pleven. Li eliris el la malliberejo kun pli firma kredo en la liberiga batalo de la laborista klaso. En 1931 j. okaze de la datreveno de la morto de Lenin, la vilaĝo estis sieĝita de la polico, por ke oni ne povu okazigi demonstraciojn. Malgraŭ tio la 21-an de januaro la vilaĝo estis surŝutita per alvokiloj. Tion organizis Dilo. Ĉiuj firmaoj en la vilaĝo estis ŝanĝitaj per ruĝaj kaj sur multaj lokoj de la vilaĝo per grandaj ruĝaj literoj oni skribis «Lenin»! Multaj estis arestistaj inkluzive Dilo. Li estis liberigita post 7 monatoj. Dume oni malkovris la konspiron en Ĉerven Brjag kaj Dilo estis kondamnita kun 30 kamaradoj je unu kaj duono da

jaroj da mallibero. Tiutempe Dilo estis kruele kaj senkompate torturita, sed li eĉ vorton ne eldiris. Sperta revoluciulo-konspiranto li majstre organizis diversajn agadojn en la malliberejo. Pro tio oni punis lin kaj aliajn kamaradojn, sendante ilin en alian malliberejon malproksiman, al multe pli severa reĝimo en Karĝali, poste en Stara Zagora.

Dum februaro 1932 j. Dilo eliris el la malliberejo kaj la tuta loĝantaro de la vilaĝo renkontis lin kun kantoj, muziko kaj floroj. Dilo denove komencis viglan agadon ne nur en la vilaĝo, sed en la tuta departemento. Li organizis nelegalajn junularajn kaj partiajn konferencojn. Dum aprilo 1932 j. li organizis nelegalan konferencon en urbo Loveĉ, kaj multaj partoprenintoj bone memoras ĝin.

Por la belega festado de la 1-a de majo 1932 j. Dilo komencis seriozan kaj diversflankan preparadon. Sed ankaŭ la policianoj ne dormis. Ili minacis, ke oni verŝos sangon, ke multaj estas mortpafotaj, ke al Dilo oni preparis anticipe tombon. Sed Dilo ne ektimis. Li faris stampilon kun surskribo: «Vivu la 1-a de majo — festotago de la laboro!» Per tiu ĉi surskribo oni preparis multajn ruĝajn rubandojn, kaj ornamis per ili la vilaĝanojn. Ni jam pretiĝis komenci grandiozan manifestadon, kiam la policano Cvjatko Valkov laŭ ordono de la vilaĝestro Koĉo Boĉev mortvundis per fusilpafo Dilon. Oni ne permesis al la loka kuracisto d-ro Aleksiev helpi al li, ĉar laŭ la policianoj post 15 minutoj li mortis. La tuta vilaĝo hirtiĝis. Dum la tuta tago Dilo kuŝis en la polvo, — ĉirkaŭita de la policianoj. Venis novaj policianoj de Lukovit kaj soldatoj. Oni arestis 22 vilaĝanojn kun la mortvundita Dilo, kondukis ilin en Pleven kaj tie kruele torturis ilin.

Dilo mortis la 3-an de majo 1932 kaj la policanoj enterigis lin kaj ne permesis al liaj proksimuloj ĉeesti ĉe la enterigo.

En la batalo kontraŭ la faŝismo vilaĝo Toros donis karan viktimon — sian plej bonan filon. Dilo fariĝis

standardo de la junuloj kaj liaj kamaradoj, kiuj inspiritaj de tia heroaĵo, daŭrigis la batalon por la feliĉo de la popolo, por la liberigo de la lando.

Mara Staneva

Literaturaj paĝoj

LJUBEN KARAVELOV (1837—1879)



Naskita en la pitoreska montarurbeto Koprivŝtica, Karavelov vivas en la jaroj de dec'aj sociaj kaj politikaj bataloj por liberigo de la bulgaroj el sub la turka jugo. Dum sia naŭjara restado en Rusio kiel lernanto kaj studento, li konatiĝis kun la

ideoj de la rusaj revoluciaj demokratoj kaj dum lia tuta vivo lin ne forlasas la penso helpi ĉiumaniere la liberigajn batalojn de sia popolo. La ideo pri Balkana federacio, pri komuna batalo de ĉiuj demokrataj balkanaj fortoj kontraŭ la otomana feŭda jingo, ligas lin kun la revolucia serba partio «Omladina». Pro tio li estis persekutata kaj malliberigata.

Ljuben Karavelov fariĝas standardo de la bulgara revolucia demokrata movado — prezidanto de la Bulgara Centra revolucia komitato, redaktoro de la ĵurnaloj «Libero» kaj «Sendependeco».

Kiel verkisto Ljuben Karavelov batalas por konfirmo de la realismo en la juna bulgara literaturo. Li sukcese rekrei la plej karakterizajn homajn tipojn kaj rilatojn en la tiama maltrankvila tempo. En la noveloj «Hajdutoj», «Neda» kaj «Donĉo» li kun admiro prezentas la figurojn de la popoldefendantoj — la hajdutoj. Sed lia plumo ne preterlasas ankaŭ la naciajn kaj sociajn subpremantojn. En vico da verkoj, kolektitaj en «Paĝoj el la libroj pri la suferoj de la bulgara gento» li prezentas al ni la terurajn bildojn de la politika, sociala kaj spirita sklaveco.

En la noveloj «Bulgaroj el la malnova tempo», «Haĝi Niĉo», «La riĉa malriĉulo», «Sur fremda tombo oni sen larmoj ploras» ni vidas majstre pentritajn bildojn de nia vivmaniero, socia vivo kaj socialaj rilatoj.

Ljuben Karavelov estas konata ankaŭ kiel poeto. Multaj liaj versaĵoj fariĝis popularaj en la tuta lando kaj ilin kantas la tuta popolo kiel popolkantojn.

Ni publikigas kelkajn liajn verkojn, tradukitajn en Esperanton de St. Kiraĝiev.

HAĜI GENĈO

Haĝi Genĉo estas tiaspeca bulgaro, kia malofte naskiĝas eĉ en Enjotago; tian homon oni ne povas trovi eĉ en Anglio. Haĝi Genĉo estas tre respektinda homo, tre bona, tre instruita kaj saĝa; li ĉion scias kaj al ĉio preta respondi, ĉar li estas viva animo kaj vigla koro. Inter la bulgaroj tia homo estas pura oro.

Haĝi Genĉo estas instruisto en Koprivŝtica. Lin ĉiu konas kiel ruĝekolorigitan ovon, ĉiu lin estimas kaj timas lian malfavoron — la ordinaraj kaj la altrangaj homoj...

Matene, kiam Haĝi Genĉo ellitiĝas, li tuj vizitas la preĝejon. Reveninte el la preĝejo hejmen, Haĝi Genĉo rostas pecon da viando sur la fajro, enverŝas iom da bonkvalita vino, prenas la salujon kaj sidiĝas, kiel li mem diras, «por ordigi iom mian intestaron»; sed antaŭ la komenco de la manĝado li detranĉas peceton de la viando por nutri sian amikon, la grasan katon, kiu pli similas al porkido ol al kato. Haĝi Genĉo neniam permesas al sia edzino kaj al siaj infanoj partopreni kun li en la manĝado; ili manĝas sekalan panon kaj sekan senbuterigitan fromaĝon, el kiu la butero aŭ la nutraj elementoj estas eltiritaj jam tiam, kiam ĝi ne estis nomata fromaĝo.

Post la manĝo, Haĝi Genĉo prenas fingringon, kudrilon, fiŝhokon kaj sian malnovan velpantalono kaj iras en la lernejon...

En sia farmo, nomita lernejo, Haĝi Genĉo bredas diversspecajn bestojn, kaj pleje meleagrojn, anserojn, kokojn kaj anasojn kaj ok grizkolorajn porkidojn kun krispa haro. Kaj mirinde, li bredas ilin elspezante nenian kapitalon.

En la lernejo de Haĝi Genĉo lernas proksimume ducent infanoj kaj en la

domo de tiu ĉi altklara instruisto preskaŭ nenio estas farata sen infanoj.

Alvenante matene en la lernejon, ili kunportas panon kaj diversajn manĝaĵojn kaj tagmanĝas en la lernejo. Kaj jen, kiam iu kokino, anserino aŭ meleagrino kovas birdidojn, tiam Haĝi Genĉo ascendas sian katedron kaj komencas paroli al la gelernantoj:

— Jen, miaj infanoj kaj gelernantoj, kun la dia helpo nia kokino elkovis dekunu kokidojn: mi al ĉiu el vi donacos po unu kokideto, sed vi devas esti dankemaj kaj nutri viajn adoptitojn kiom eble pli bone.»

La infanoj ĝoje nutras la birdidojn kaj kun granda plezuro rimarkas, ke la adoptitoj kreskas kaj grasiĝas; sed unu matenon la plej bela, la plej grasa kaj la plej granda birdido perdiĝas — kvazaŭ ĝi dronas en la teron. La knabeto serĉas sian birdidon, valoran adoptiton, por nutri ĝin kaj iom karesi ĝin, sed ĉiuj penoj kaj serĉoj vanis. Ĉar tiu ĉi adoptito en la sama tempo kuiriĝas en la nigriĝinta kaldroneto kun ruĝa tenilo, kaj Haĝi Genĉo kun la kulero enmane marŝas ĉirkaŭ la kaldroneto kaj kriegas al avino Haĝiedzino:

— Aldonu iom da bulbeto, aldonu iom da butero... ankaŭ iom da pipro necesas. Iomete! Streĉu viajn okulaĉojn, ĉar la fajro estas forta kaj la bulbo povas trobruliĝi... Ne aldonu pli da lignaĵo. Haĝiedzino, plej bone estas, kiam la manĝaĵo kuiriĝas malrapide.

La knabeto iros plorema al Haĝi Genĉo kaj diros al li:

— Avo Haĝi, ĉu vi scias kia malfeliĉo trafis mian kapon? Ĉu vi scias, ke mankas mia birdido?... Nikola diras, ke hieraŭ aglo ĉirkaŭflugis su-

per via domo... verŝajne ĝi forman-
ĝis ĝin, estu malbenita! Ŝtonojn ĝi
manĝu, por ke ili venenigu ĝin!

Haĝi Genĉo lasas la kuleron, kap-
tas la lernanton, altrenas lin en la
lernejon kaj ektusinte du-tri foje,
komencas paroli:

— Aŭskultu, infanoj! Vi jam delon-
ge scias, ke nia nigra kokino kovis
tri belajn kokidojn — unuj el ili estis
krestohavaj, kaj la aliaj kalsonha-
vaj — kaj mi kiel homo kun bona ko-
ro kaj kompatema animo donacis al
vi po unu birdido; sed mi donacis ilin
al vi, por ke ankaŭ vi havu kompa-
temajn animojn; kiel oni diras, mi
donacis ilin, por ke vi nutru ilin,
ilin amu kiel verajn gefratojn
kaj ilin defendu kontraŭ la agloj kaj
la kestrelaj. Sed mi eraris — vi men-
sogis min kaj primokis mian malju-
necon. Lastajn tagojn mi rimarkis,
ke la blanka birdido kun la nigraj
flugiloj, kiu havis ankaŭ sur la vos-
to du nigrajn plumojn, ko-
mencas malgrasiĝi kaj iel sinfor-
gesi. «Kiuj estas la kaŭzoj?» — mi
enpensiĝis.. — Ĉu ĝin ne infektis la
pipso, ĉu ĝin ne infektis la diferito
kaj ĝi malsanas, ne povante klarigi
sian malsanon? Mi kaptis ĝin kaj
pririgardis — nenia malsano. Mi pal-
pis ĝian kropeton — malplena! ... —
«A, a, a!» Tiel viaj gelernantoj nu-
tras la birdidojn!» — mi ekpensis. —
Kaj vi, stulta maljunulaĉo, Haĝi Gen-
ĉo, ilin donacis al tiaj vagabondoj! ..

Do, mi forbuĉis la birdidon. Kaj kion
mi povis fari? Ĉu mi lasu ĝin formor-
ti pro malsato? Sed via avo Haĝi es-
tas bona kaj justa homo kaj pro
tio mi devas diri al vi, ke ankaŭ li
estas iom kulpa pri la afero. Kiu scias,
eble Pejo ne havis hieraŭ multe
da pano, eble lia patrino hieraŭ ne
knedis panon, aŭ li forgesis nutri
sian adoptiton! Jen pro kio mi deci-
das korekti mian eraron kaj konsoli
Pejo-n. Pejo ne ploru kaj ne bedaŭru,
ke mi forbuĉis lian birdidon, ĉar mi
donacos al li ion pli bonan; mi dona-
cos al li la flavan meleagrinon. Do,
mi hodiaŭ donacas tiun ĉi meleagri-
non al Pejo, se li nutros ĝin kiel po-
pon.

Kiam Haĝi Genĉo finis sian predi-
kon, li ekfrapetis la knabeton sur am-
baŭ vangojn, iom ekbatis lin sur la
kapon kaj diris al li:

— Kisu mian manon kaj danku al
mi, ke anstataŭ birdido, vi gajnas tu-
tan meleagrinon.

La knabeto kisas la malvarman
dekstran manon de Haĝi Genĉo, kaj
Haĝi Genĉo sin turnas al la geler-
nantoj kaj ordonas al ili: «Legu,
hej!» kaj poste eliras el la lernejo,
alkuretas al la fajrujo kaj reprenas
la kuleron. Haĝi Genĉo estas tre
ĝoja kaj konsoliĝas, ke la knabeto
restis kontenta, kaj la meleagrinon
bezonos li mem post la senvianda
ekfasto.

VENIS LA PRINTEMPO

Venis la printempo, birdo
ĉe Balkano kantas;
verdas herboj gaje, flirte,
kaj prunarbo blankas.
Nigras nur Murgaŝ¹ ankoraŭ
ĉe la firmamento

kaj malĝoje, kaj angore
al Balkan' lamentas:
— Ho, kunfrato plej fidela,
ĉu vi min komprenas?
Ĉio antaŭ mi malhelas,
la viv' malserenas!

¹ Murgaŝ — monto en Okcidenta Bulgario.

Mi suferas, mi malsanas,
 ĉar mi portas bridojn,
 ĉar mi vidas — la tirano
 buĉas miajn idojn.
 Mi ne volas, ne toleros
 kiel sklav' humila
 nur sopiri la liberon

kaj estonton brilan...
 Mi ne kredas, ke monaĥo
 savos la popolon, —
 la libero ne ekzarkon, —
 Karaĝa-on² volas!
² Karaĝa — bulgara ribelulo kontraŭ la
 turka jugo.

BELA ESTAS VI, ARBARO

Moderato



Bela estas vi, arbaro,
 junon bonodoras,
 sed la koroj pro bedaŭro
 kaj malĝoj' doloras.

(2)

Viaj kverkoj, viaj fagoj,
 densaj foliaroj,
 kaj la floroj, klaraj akvoj,
 grasaj ŝafidaroj.

(2)

(2)

Kiu vin ekvidas foje,
 li bedaŭras ĉiam,
 ke sub viaj ombroj ĝoje
 ne putriĝos iam.

(2)

(2)

kaj la herboj, peonioj,
 malvarmeto sorĉa —
 kvazaŭ plumbo pezas ĉio
 sur la kor' maldolĉa.

(2)

(2)

Kaj se iu devas ĉesi
 vin viziti plue,
 li ne povas vin forgesi
 dum la vivo brua.

(2)

(2)

Kaj la koro ekbatante
 ĉiam malgajiĝas,
 kiam vidas, ke konstante
 la natur' juniĝas;

(2)

(2)

Bela estas vi, arbaro,
 junon bonodoras,
 sed la koroj pro bedaŭro
 kaj malĝoj' doloras

(2)

(2)

kiam vidas, ke l' printempo
 la maljunon pelas,
 kaj dum frost' sub neĝ' je tempo
 ĝermas vivo bela.

(2)

(2)

Sciu — avo kvakas,
kiam vin konsilas:
sabro ne forhakas
kapon, kiu humilas.

La buĉist' forbuĉas
la bovojn naivajn,
kaj la lupoj suĉas
sangon sanaj, vivaj.

Minko Conevski

RAKETOJ

Ili alten
solene
sin ĵetas, sin ĵetas,
flugkuras,

kaj revenas
surteren
post turn',
kaj aŭguras,
ke baldaŭ, tre baldaŭ
ni konkeros
la kosmon sekretan
per ŝturm'.

Ili naĝe impetas, impetas
trans la lun',
kaj kuraĝe
trumpetas, trumpetas

senhalte,
ke nun
sur la tero
loĝas agloj
— komunistoj,
kiuj salte
prosperas, prosperas,
ĉar revas
kaj kreas
persiste miraklojn!

Ili flugas
kaj plugas
la spacon,
kaj konfirmas
kaj ŝirmas
la pacon!

El bulgara reverkis: **Stefan Kiraĝiev**

RIDO - PLORO

Esperanto malpermesata

— Kion!... Kie? Ho teruraĵo! Ĉu nova Hitlero aperis en nia malfeliĉa mondo? ! Kia domaĝo! ...

Ne sentrankviliĝu, karaj idealemaj kaj abnegaciaj gesamideanoj. Nenia Hitlero aperis. Delonge la gepatroj de la nunaj vermoj forgesis pri la belaj tagoj, kiam ili manĝis la karnon de la iamaj pretendantoj por regantoj de la tuta mondo — la malamikoj de la homaro kaj de Esperanto. Delonge la honestaj homoj ne rememoras pri ili.

— Sed kiu do povus malpermesi Esperanton?

Tio okazis en la esperantista societo «Maksim Gorki». «Gorki» en bulgara lingvo signifas «kompatinda». Jes, kompatinda societo! Je la 8-a de januaro k. j. la prezidanto de la kunveno generalo Mortesko malpermesis la paroladon en Esperanto...

Nevole enŝoviĝis en mian memoron la delonge forpasinta fakto de malpermeso de esperanta parolado dum la kongreso en Pazarĝik en 1937 ja-

ro. Mi kvazaŭ nun vidas la bildon: eniris la kunvenejon civile vestita agente de la polico, flustris ion al la prezidanto kaj la prezidanto deklaris, ke oni devas paroli nur en bulgara lingvo. Indigno surverŝis la kunvenejon. Oni volis protesti, sed la prezidanto ne permesis protestojn. Tiam sprita samideano deklaris: «Ni ne protestas, sed ni nur miras, mi ne komprenas...»

Tia bildo aperis en mia memoro dum tiu bedaŭrinda kunveno de la kompatinda societo «M. Gorki» je la 8-a de januaro 1959. Sed nun neniu nekonata homo eniris la kunvenejon, neniu flustris al la prezidanto. Sed la prezidanto-generalo ordonis. Li eĉ insultis (kompreneble bulgarlingve, ĉar esperante li verŝajne ne scipovas) la parolantojn en Esperanto. Mi volis esprimi mian «miron», «nekomprenon», ĉar kiel ĉiuj ĉeestantoj, ankaŭ mi timis protesti antaŭ la morte severa vizaĝo de generalo Mortesko. Sed li abrupte malpermesis al mi tion fari. La aliaj membroj de la estraro provis mildigi la ardan atmosferon. Venkov diris, ke ĉar ĝis nun en organiza laboro neniu partoprenis, oni volas diskutigi la societan agadplanon bulgarlingve, por ke la novaj esperantistoj ankaŭ partoprenu.

— Sed ni volas en Esperanto, — aŭdigis sin timeme nova kaj juna samideanino.

— Vi tute ne volas, — interrompis ŝin Musa Kvinrov, — ĉar vi ne scipovas ĝin.

Oni voĉdonis. La kunveno decidis, ke ĉiu laŭvole povas paroli bulgare aŭ esperante.

La pridiskuto de la plano ekmarŝis pene. Oni faris du-tri bagatelajn proponojn...

Ĝis nun nerimarkite, kvazaŭ indi-

ferente sidis sur la benko post la forno aĝa grizhara samideano kun serioza, sed milda mieno. Li estis Anĝelo Efirov, malnova pioniro de nia movado. Modeste li levis manon. Li intencis proponi interesajn formojn de agado. Ekzemple okaze de la Zamenhofa jaro la societo organizu rondojn pri la lernado de la biografio de Zamenhof, aŭ de la historio de Esperanto, oni trovu novajn fontojn pri financaj rimedoj, kiumaniere oni organizu la regulan kolektadon de la membrokotizo... Ankoraŭ kelkajn gravajn kaj interesajn iniciatojn li volis proponi. Sed, malfeliĉulo, li komencis paroli en Esperanto. Generalo Mortesko leviĝis morte minace.

— Haltu! — ekmuĝis li. Mi deprenas de vi la parolon. Maldisciplinitaj aĉuloj daŭrigas paroli en Esperanto!

Efirov dum sia 30-jara esperantisteco neniam spertis tian maldelikatan tonon, tian fiordonecon. La sango frostiĝis, la vizaĝo paliĝis kaj li... svenis...

— Forjetu la kadavron — kun trankviligita tono ordonis la generalo. — Ĝis nun nia societo marŝis malbone, ĉar ĉiam oni parolas en Esperanto. Ni parolu en bulgara lingvo kaj vi vidos kiel ni ekfloros...

Post tiu prudenta klarigo, ĉiuj silente komprenis, ke la bulgara lingvo estas la lasta espero de la estraro — ĝia talismano. Vere, neniu plu faris proponojn. Vere, la humoro malboniĝis. Eble iuj foriris ofenditaj! Vere, la estraro ne aŭdis la valorajn sugestojn de spertaj samideanoj. Sed ĉu ĉio ĉi estas grava? Ne! Gravas la talismano! Kun la talismano antaŭen! Uzante la bulgaran lingvon, societo «Maksim Gorki» verŝajne ne estos plu ĉe la vosto de la enlanda Esperanto-movado.

Vio Skorpioni

En nia Esperanto-klubejo mi de tempo al tempo rimarkis unu samideanon, kies fizionomio estis tre konata al mi. Mi penis rememori de kie mi konas lin, sed vane mi streĉadis mian memorkapablon.

Cetere min impresis speciale tio, ke tiu samideano bonorde sidis, pasive aŭskultis kaj neniam partoprenis diskutadon por fari eldiron. Ĉu li estis singena aŭ simple preferis nur aŭskulti?

Pli stranga estis ankoraŭ unu momento: rimarkante min, li ridetis afable kaj salutis min. Tio pli interesis min. Mirinde, kiu li povas esti?

Iun vesperon, post la finiĝo de la kunveno, tiu samideano neatendite alproksimiĝis al mi. Li volis demandi pri la signifo de unu vorto nekonata al li.

Tiam mi klarigis al li detale la signifon de la vorto kaj provis interparoli kun li. Tamen li komencis senkulpigi sin pro neposedo de la lingvo.

— Ĉu vi eble estas nova esperantisto, — mi demandis lin.

— Ne nova, malnova mi estas, sed mi ne sukcesis bone ellerni la lingvon, — respondis li.

— Kial?

— Ĉar la kursgvidanto instruis nemetodike, estis ofte distrita, neniam paroligis min kaj miajn samkursanojn, unuvorte li estis ne bona kursgvidanto.

— Ha, tre interese. Tiaj kursgvidantoj estas riproĉindaj!

— Kaj bedaŭrindaj.

— Cetere, kiu estis via kursgvidanto? — mi demandis lin scivoleme.

— Mia kursgvidanto? — ekmiris la samideano.

— Jes, via kursgvidanto! Ĉu eble vi ne rememoras lian nomon.

— Mi rememoras bone...

— Do, kiu li estis? — insistis mi.

— Se vi insistas, mi diros al vi... — murmuris li.

— Ĉu mi konas lin?

— Jes, — prononcis artikulate li.

— Kiu, do?

— Vi mem...

— Ĉu?!...

Mikaelo

Lingva konsilejo

KUNMETITAJ VORTOJ

Nur 904 vortradikoj, kiuj enestis en la UNUA LIBRO de Zamenhof (1887), konsistigis la komencan vorttrezoron, kun kiu Esperanto startis fariĝi internacia helpa lingvo. Tamen per tiu ĉi ridinde malgranda vortprovizo kaj helpe de sia simpligita gramatiko kaj produktiva afiksaro Esperanto pretendis kapabli esprimi ĉiujn nuancojn de l' homa penso. Kaj efektive la 2666 vortradikoj de la **Fundamento de Esperanto** (1905) ebligis starigi nekredeble riĉan vortaron, tradukantan multe pli da ideoj, ol enhavis la nacilingvaj vortaroj mem.

La kunmetitaj vortoj ebligas al ni fari nelimitan nombron da fajnaj nuancoj kaj trafaj esprimformoj de novaj specialigitaj ideoj. Tiamaniere la kunmetitaj vortoj apud la neologismoj prezentas aldonan kaj atentindan fonton por pliriĉigo de la moderna vorttrezoro de Esperanto.

La kunmetitaj (kombinitaj) vortoj formiĝas el kunigo de du aŭ pluraj simplaj vortoj. La ĉefa vorto laŭregule staras ĉe la fino. La plejmulto de la kunmetitaj vortoj konsistas el du substantivoj interdependaj aŭ interrilataj. Kiam la koncernaj substantivoj ne estas tiel kunmetitaj, tiam ilia pozicio devas esti inversigata kaj inter ili oni devas uzi iun prepozicion:

libroŝranko (ŝranko por libroj),
manĝoĉambro (ĉambro por manĝoj),
dormĉambro (ĉambro por dormoj),
patrolando (lando de patroj),
artokreaĵo (kreaĵo de la arto).

Ordinare la finaĵon-o de la unua substantivo oni forlasas, se la kunmetita vorto estas facile prononcata, ekz.:

banĉambro (ĉambro por banoj),
infanĉambro (ĉambro por infanoj),
okulvitroj (vitroj por la okuloj),
stacidomo (domo de stacio),
semajnfino (fino de semajno).

Se la kunmetitaj vortoj estas malfacile prononceblaj aŭ ties partoj — malfacile distingeblaj, oni uzas streketon inter la apartaj simplaj vortoj por precizigi kaj finklarigi la kunmetaĵon:

ski-sporto,
soldat-alarmo (ne soldata larmo!),
krucvort-enigmo,
Esperanto-lingvokulturo.

Iufoje ĉe kunmetaĵoj la lasta konsonanto de la unua simpla vorto estas la sama kia la unua konsonanto de la dua vorto: dorssako, morttimo, littuko, vivvolo, vorttrezoro ktp.

La kunmetitaj vortoj ne ĉiam estas substantivoj kaj ne ĉiam formiĝas nur el substantivoj. Ankaŭ adjektivoj, adverboj, verboj ktp. formas kunmetitajn vortojn, ekz.:

adj. — grizaskvama fiŝo (fiŝo kun griza skvamo),
fajroruĝaj kokoj (kokoj ruĝaj kiel fajro),
verdebluaj ŝtonoj (ŝtonoj bluantaj verde).

verb. — bruldifekti,
punrepagi,
ŝteliri;

part. — muskokovrita ĉerizo,,
pajlotegita kabano,
sagtrafita koro,
ŝultrolevante.

Bonvolu noti kaj atenti la variadon de l' intervorta kuniga vokalo, kiu estas jen — a, jen — o, jen — e!

Ĉiu bona Esperanto-nacilingva vortaro enhavas kaj tradukas krom ĉiujn vortradikojn kaj derivaĵojn ankaŭ pli aŭ malpli da kunmetitaj vortoj. La granda Esperanto-franca vortaro Waringhien (1957) enhavas tre multe da kunmetitaj vortoj. Kaj la plej nova Esperanto-hungara vortaro (1958) enhavas ĉirkaŭ 13 500 kunmetitajn Esperanto-vortojn!

Do la kunmetitaj vortoj kontribuas grandskale kaj inĝenie al la daŭra pliriĉigo kaj freŝigo de la vorttrezoro de Esperanto. Tial legante bonstilajn Esperanto-literaturaĵojn, klopodu ĉiam zorge kompreni la novajn intereso-plenajn kaj bildecajn kunmetitajn vortojn kaj ilin skribe noti en apartaj listoj aŭ kajeretoj. Kaj baldaŭ vi akiros abundan kaj valoran vortprovizon por viaj konversacioj aŭ skribaĵoj.

inĝ. Stefan Maserov

EN LA DISPUTO NASKIGAS LA VERO

Esperanto kaj la majusklomanio

La malfacilaĵoj en la naciaj lingvoj devenas antaŭ ĉio el la miljara disvolviĝo, senplana, senkonscia. Rezulte de tio estas kreataj diversaj formoj, kiuj deflankiĝas de la reguloj, estas kreataj formoj nelogikaj, tamen uzataj pro la forto de la tradicio. Tiaj mallogikaĵoj, uzataj nur pro la tradicio, estis la neprononcataj literoj en la bulgara ortografio, kiuj sence estis uzataj dum jarcentoj, tiaj estas la literoj en multaj lingvoj kun diversa signifo, neprononcataj literoj, la idiomoj, kiuj havas signifon, havantan nenion komunan kun la logiko.

La plej grava kvalito de la internacia lingvo Esperanto estas ĝia simpleco kaj ĝia logikeco. Tio destinas ĝian rapidan disvastiĝon kaj vivkapblon. Feliĉe ĝi havas malgrandan tradicion kaj maloftajn tradiciajn mallogikaĵojn. Tamen ĝi ne povas esti libera de la influo de la naciaj lingvoj. Tia influo estas la troa uzado de la majuskloj. Ofte ni skribas per majusklo ne nur proprajn, nomojn de homoj, ne nur ĉiujn vortojn de plurvortaj geografiaj nomoj, nomojn de organizaĵoj ktp. Oni majusklumas eĉ tiajn substantivojn kiel «societo», «sekcio», «partio», «estaro», «komitato», «kongreso» k. s.

Tiu malklera, burokrata «ortogra-

fio» multe komplikigas la lingvon kaj kontraŭas al ĝia spirito. Se tiuj majusklomaniuloj opinias, ke la majusklo enspirigas aŭtoritaton al la koncerna objekto, ili trompas sin kaj embarasas la legantojn.

Dum jarcentoj la vorto «dio» estis skribata per majusklo, sed malgraŭ tio la bulgara popolo estas malpia, la eklezio preskaŭ nenian influon havas sur ĝin.

Unu el la plej valoraj kvalitoj de Esperanto estas la facileco de ĝia ellerno. Ni devas konservi kiel sanktaĵon tiun kvaliton, kiu estas la plej grava argumento por Esperanto kiel internacia lingvo. Pro tio ni devas atenti ankaŭ al la uzado de majuskloj. Ili devas servi nur kiel signo de nova frazo kaj de propra nomo: ĉu de homo, ĉu geografia, ĉu de socia organizaĵo ktp. Kial ni devas skribi «kongreso»-n per majusklo, aŭ «sekcio»-n? Ĉu ĉar ili estas iaj sanktaĵoj? «Bedaŭrinde» (por iuj) la epoko de la kultoj, de la sanktaĵoj kaj sanktuloj, de la fetiĉoj, jam forpasas.

Mi opinias, ke ĉe skribado de geografiaj nomoj, nomoj de organizaĵoj k. a. konsistantaj el kelkaj vortoj, sufiĉus, se nur la unua vorto komenĉiĝus per majusklo. Tiel ni skribu: «Bulgara esperantista asocio» anstataŭ «Bulgara Esperantista Asocio»,

gazeto «Bulgara esperantisto» anstataŭ «Bulgara Esperantisto», «Nigra maro» anst. «Nigra Maro» ktp.

Oni povas uzi majusklon ankaŭ ĉe skribo de iuj superaj gvidorganoj de ŝtatoj aŭ organizaĵoj ekz.: Ministerio de eksteraj aferoj, Centra komitato, Ministra konsilantaro ktp., sed la skribado per minusklo ne devas esti konsiderata malkorekta. Sed iliaj mallongigoj devas esti skribataj per majuskloj por apartiĝi de la cetera teksto kaj por klareco. Ekz.: CK, BE, BKP, IOK k.a.

La tendenco devas esti malplioftigo de la majuskloj. Nenia neceso ekzistas skribi la tagojn de la semajno, aŭ la monatojn per majuskloj. «Es-

peranto»-n ni povas skribi per majusklo (nomo de lingvo) aŭ per minusklo. La ŝatantoj de titoloj, se neprevolas skribi tiujn malnecesajn vortetojn kiel «sinjoro», «fraŭlino» «kamarado», «samideano», «doktoro» k. a., devas ilin skribi per minuskloj.

Ju malpli da majuskloj, des pli simpla ortografio, des pli facila lingvo — tio estas en la spirito mem de Esperanto, kiun donis al la lingvo ĝia aŭtoro d-ro L. L. Zamenhof.

VIO

Rimarkigo: En tiu rubriko ni publikigos ĉiun opinion pri lingvaj, organizaĵ kaj teoriaj demandoj.

ESPERANTO EN LA MONDO

Sescent urbestroj en Eŭropo proponas Esperanton

668 urbestroj el 12 eŭropaj landoj ĝis nun respondis al enketo pri Esperanto, farita de speciala internacia komitato de urbestroj laŭ iniciato de la urbestro de Mainz, Franz Stein. 581 el ili esprimis la opinion, ke la internacia lingvo, kiu «pro sia facileco povas esti lernata en plej mallonga tempo kaj pro sia neŭtraleco ne ofendas la naciajn sentojn de kiu ajn popolo», povas doni taŭgan solvon al la lingvoproblemo. 586 urbestroj komisiis al la internacia komitato de urbestroj entrepreni la necesajn paŝojn, por ke la uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj «fariĝu ĝenerala tiel, ke samtempe estu protektata la rolo de la lingvo de tiuj nacioj, kies lingvoj ne estas vaste disvastigitaj». Aparte rimarkinda estas la intereso, vekita de

la enketo en Greklando kaj Norvegio, kie ĉiuj respondintaj urbestroj unuanime deklaris sin favoraj al Esperanto, kaj en Britio kaj Italio, kie respektive 92% kaj 99% de la respondintaj urbestroj esprimis apogon al la internacia lingvo.

En Ĉinio

Jus aperis en Ĉinio la unua 168-paĝa volumo de nova Esperanto-lernolibro en ĉina lingvo. La lernolibro estas verkita de Vanlo Fon. La unua volumo konsistas el 16 lecionoj, respondantaj al la fundamentaj reguloj de la internacia lingvo. La dua volumo aperos post kelkaj monatoj kune kun legolibroj en Esperanto. Unuan fojon post la fino de la milito oni eldonas en Ĉinio lernolibron de la internacia lingvo.

(Laŭ Internacia gazetara servo ĉe UEA)

KURSA AGADO

SOFIO. Dum la aŭtuno 1958 estis malfermitaj 22 kvarmonataj, pagataj Esperanto-kursoj kun 411 partoprenantoj. La kursoj dividiĝas jene:

1. Por aktoroj — 2 kursoj kun 20 partoprenantoj;
2. por ĵurnalistoj — 1 kurso kun 15 partoprenantoj;
3. por civitanoj — 9 kursoj kun 186 partoprenantoj;
4. por studentoj — 3 kursoj kun 52 partoprenantoj;
5. por lernantoj — 6 kursoj kun 108 partoprenantoj;
6. por surdmutuloj — 1 kurso kun 30 partoprenantoj.

El ĉiuj kursoj 3 estas superaj: 1 por civitanoj kun 20 kursanoj, 1 por studentoj kun 20 kursanoj kaj 1 por aktoroj kun 10 kursanoj.

La partopreno de surdmutuloj kaj lernantoj en la kursoj estas senpaga.

Ni donas komparan tabelon de la kursoj:

jaroj	kursoj	partoprenantoj
1955/1956	22	440
1956/1957	47	1181
1957/1958	22	378
1958/1959	22	411

Do, ni streĉu niajn fortojn kaj dum la monatoj februaro kaj marto ni malfermu novajn kursojn!

D-ro St. Moraresku
respondeculo pri la kursoj

SCIIGOJ

La 20-an de decembro 1957 j. mortis la konata bulgara esperantisto d-ro **ATANAS ATANASOV** — **AGRO**. Multaj enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj miksis la nomon de **AGRO** kun la nomo de alia samnomulo **ATANAS D. ATANASOV** — **ADA**, kaj sendas al la adreso de la lasta kondolencojn. Ni sciigas al ĉiuj, ke s-ano **ADA**, longjara eksprezidanto de Bulgara esperantista asocio, aŭtoro de lernolibro, ĝuas bonan sanon kaj daŭrigas sian aktivan laboron por la triumfo de nia movado.

*

La 5-an de marto mortis la malnova esperantisto d-ro **Zahari Zahariev**. Niajn kondolencojn al la funebroj.

DEZIRAS KORESPONDI

USSR. Boris Kolker, ul. Ŝĉuseva 23, Kiŝinev, Moldavio — kun ĉiuj landoj en Esperanto, rusa kaj franca lingvoj. Interŝ. pk, pm, esperantajjn. Respondo certa.

USSR. Feodor Karnoviĉ, Lenina 15, Sevsk, Brjanskaja oblast — kun bulgaraj esperantistoj pri ĉ. t. speciale pri kulturo, literaturo, moroj.

USSR — Odesa, Primorskij bulv. 14, Gorkom Komsomola, Urba Studenta Klubo (Esperanto) — gestudentoj 18-19-jaraj pri ĉiuj temoj.

Vietnamio — Hanoi, 68-Str. Hang Ma, Nguyen The Hung (lernanto 19-jara).

Grupo de 13-14-jaraj infanoj — kun la tuta mondo. Adreso de la kursgvidanto: Bulgario, Petriĉ. Ivan Apostolov Trajkov, str. Ekzarh Josif 13.

